

# FRANCISCO CÂNDIDO XAVIER

## BIOGRAFIAJ TRAJTOJ

### I - NASKIĜO. INICIĜO EN SPIRITISMO

La plej granda kaj fekunda psikografia mediumo en la mondo kaj en ĉiuj tempoj naskiĝis en Pedro Leopoldo, modesta urbo de la Ŝtato Minas Gerais, Brazilo, en la 2<sup>a</sup> de Aprilo 1910. Ekde 1959 li loĝas en la samŝtata urbo Uberaba. Li nur ricevis la unuagradan instruadon.

Gepatroj: João Cândido Xavier kaj Maria João de Deus, elkarniĝintaj resp. en 1960 kaj 1915. Malfacila infaneco: li estis komizo en butikoj kaj publika oficisto emeritita en 1958.

En la 7<sup>a</sup> de Majo 1927, li ĉeestas sian unuan spiritisman seancon. Ĝis 1931 li psikografie ricevas multe da poemoj kaj mesaĝoj, el kiuj pluraj estis publikigitaj, sen lia scio, sub la aŭtonomo F. Xavier. En tiu sama jaro li unuafoje vidas la Spiriton Emmanuel, kiu ĝis nun restas lia nedsigebla spirita mentoro.

### II - LA KNABO FRANĈJO

Ekde la kvarjara aĝo la vivo de la knabo Franĉjo estis karakterizita per kuriozaj fenomenoj. Lia patro eĉ kredis, ke oni anstataŭigis lian veran filon per tiu alia infano... Kiel stranga ja estis tiu filo!... Edukita en la katolika religio, la knabo pie preĝadis, kiel al li instruis lia amata patrino, S-rino Maria João de Deus, kiu lasis lin en orfeco, kiam li ankoraŭ aĝis 5 jarojn.

Sub la premo de grandaj konfliktoj kaj plej akraj malfacilaĵoj, la knabo kreskadis, ĉiam pura kaj bona, tute ne inklina al ia fiesprimo, al ia malobeo ago.

Sed la amikaj "ombroj" lin ne forlasis... Li interparoladis kun la elkarniĝinta patrino, aŭdis konsolantajn voĉojn. En la lernejo li sentis, ke ili apudestas kaj lin helpas ĉe la ordinaj taskoj.

Efektive, la unuaj jaroj de lia vivo faris en li profundajn impresojn, kaj tiujn jarojn li neniam forgesis... La bezono perlabori ekde frua aĝo por helpi en la mastrumaj elspezoj signifis por lia vivo, kiel li mem asertas, netakseblan benon.

Vere, la malsano ankaŭ frue venis por lin ĉiam kompanii. Unue ĉe la pulmoj dum lia teksista laborado; poste ĉe la okuloj; nuntempe estas la vico de la brustangino.

### III - KOMENCO DE LA MEDIUMATO

Francisco Cândido Xavier (Franĉjo Ŝavjer') publike komencis sian median mision en la 8<sup>a</sup> de Julio 1927, en la urbo Pedro Leopoldo.

Aĝante 17 jarojn, li ricevis siajn unuajn medianajn paĝojn.

En memorinda punkto, la Spiritoj komencis unu el la plej belaj entreprenoj en la tuta historio de la Homaro. Dek sep paperfoliojn ili plenigis per teksto pritraktanta la devojn de kristana spiritisto.

Pri tio rakontas Franĉjo Xavier mem:

"(...) Estis punkto preskaŭ frosta, kaj miaj ĉetablaj kunuloj sekvis, scivolaj kaj kortuŝitaj, la movojn de mia brako. Ne granda estis la ĉambro, sed ĉe la komenco de tiu unua transsendo de ia Transtomba komunikaĵo, mi vidas min ekster mia karna korpo, tamen apud ĝi. Kaj dum la spirita kuriero skribis tiujn al mi dediĉitajn dek-sep paĝojn, mia ordinara vido spertis signifoplenan aliigon. Malaperis la nin ĉirkaŭantaj muroj. La tegmento kvazaŭ malfariĝis, kaj, rigardante al la supro, mi povis vidi stelojn trembrilantajn en la punkto mallumo. Sed, turninte la okulojn al la ĉambro, mi rimarkis, ke tuta aro da amikaj Spiritoj fiksas sur min simpatian kaj bonkoran rigardon, kaj en ilia esprimo mi divenis, per spontanea telepatio, ke ili silente kuraĝigas min al la plenumota laboro, ĉefe per la admono, ke mi timu nenion koncerne al la irota vojo."

#### **IV - EMMANUEL KAJ DU ADMONOJ KONCERNANTAJ LIAN TUTAN VIVON**

Emmanuel, en la unuaj tempoj de la mediuma agado de Franĉjo Xavier, donis al li du bazajn instruadmonojn por plenumo de lia estonta laboro. La malobservo de nur unu el ili nepre fiaskigos la tuton. Jen la unua:

- "Ĉu vi vere pretas labori per la mediumeco kun Jesuo?

- Jes, se la bonaj Spiritoj min ne forlasos... - respondis la mediumo.

- Vi ne estos forlasita - asertis Emmanuel - sed, por ĉi tion certigi al vi, vi nepre laboru, studu kaj praktiku la bonon.

- Kaj ĉu vi opinias min kapabla por tia devontigo?

- Sendube, se nur vi observos la tri bazajn kondiĉojn por la Servado...

Ĉar la spirita Protektanto restis silenta, la junulo demandis:

- Kiu estas la unua?

La respondo venis, firma:

- Disciplino.

- Kaj la dua?

- Disciplino.

- Kaj la tria?

- Disciplino."

Pri la dua plej grava admono de Emmanuel la mediumo rakontas:

- "Mi memoras, ke en unu el liaj unuaj kontaktoj Emmanuel al mi sciigis, ke li intencas longe laboradi kun mi, sed por tio mi devos antaŭ ĉio strebi al la praktikado de la instruoj de Jesuo kaj de la lecionoj de Allan Kardec. Li ankoraŭ avertis, ke se iam li, Emmanuel, al mi konsilon nekonforman al la instruoj de Jesuo kaj Kardec, mi devos forgesi lin kaj resti ĉe Jesuo kaj Kardec."

-

#### **IV - LITERATURA VERKADO**

En 1932, la Brazila Spiritisma Federacio publikigas lian unuan libron, nome la faman "Transtomba Parnaso"; nun pli ol 400 estas la nombro de la verkoj, kiujn li psikografie skribis. Pluraj jam estas tradukitaj kaj eldonitaj en la lingvoj hispana, Esperanto, franca, angla, japana, greka, k.a.

Vivante laŭ morale pura konduto, efektive humila kaj simpla, Franĉjo Xavier neniam havigis al si ian ajn profiton el la mediumeco. Lia intima kaj publika vivo estas ĉiel esplorata de la amaskomunikiloj parola, skriba kaj televida. Mokoj kaj malicaj kritikoj lin ofte trafas, sed li ilin suferas kun vera kristana sinteno. Li vojaĝis kun la mediumo Waldo Veira al Usono kaj Eŭropo, kie ili vizitis Anglion, Francion, Italion, Hispanion kaj Portugalion, ĉiam en la servo de la Spiritisma Doktrino.

Nuntempe Franĉjo Xavier estas figuro kun renomo nacia kaj internacia, liaj intervjuoj vekas la atenton de miloj da personoj, eĉ de tiuj seninterese rilatantaj al Spiritismo; li jam aperis en televidaj programoj, kie li respondis al plej diversaj demandoj surbaze de la spiritismaj instruoj. Pluraj urboj aljuĝis al li la titolon de Honora Civitano: Rio de Janeiro, São Bernardo do Campo, Franca, Campinas, Santos, Catanduva, en la Ŝtato Sankta Paŭlo; Uberlândia, Araguari kaj Belo Horizonte, en la Ŝtato Minas Gerais; Campos, en la Ŝtato Rio de Janeiro, ktp, ktp.

El la libro, kiujn li psikografie ricevis, jam vendiĝis pli ol 12 milionoj da ekzempleroj nur inter tiuj 88 eldonitaj de la Brazila Spiritisma Federacio.

"Transtomba Parnaso", kiu estis publikigita la unua en 1932, elvokis (kaj pruvis) la demandon pri la identeco de la spirita aŭtoroj de la mediumaj literaturaj verkoj, dank'al la spontanea manifestiĝo de tiaj

kritikistoj, kiel Humberto de Campos, kiu tiam ankoraŭ estis inter la vivantoj, kiel Agripino Grieco, nacirenoma, rigora literatur-kritikisto, Zeferino Brasil, gaúça poeto, Edmundo Lys, kronikisto, Garcia Júnior, ktp.

En sia antaŭparolo al "Transtomba Parnaso", Manuel Quintão asertis: "Romantikismo, Kondorismo, Parnasismo, Simbolismo tie paradas per ĉarmaĵoj el sonoj kaj koloroj, atestante, ne plu subjektive sed ja plej objektive, la transvicon de siaj adeptoj. Ni legas Casimiro-n kaj reĝuas "Printempoj"; recitas Castro Alves kaj sentas "Flosantaj Ŝaŭmoj"; deklamas Junqueiro kaj memoras "La Morto de Don Johano"; legas Aŭgusto dos Anjos kaj elvokas "Mi".

Historiaj romanoj formas la Roman serion, konsistantan el: "Antaŭ 2000 jaroj...", "Post 50 jaroj", "Saluton, Kristo!", "Paŭlo kaj Stefano", kiuj instigis Roberton Macedo verki "Histori-Geografian Glosaron pri la Romanoj de Emmanuel", ian klarigan studon pri la historiaj eventoj menciitaj en tiu verkaro. "Antaŭ 2000 jaroj..." rakontas pri la enkarniĝo de Emmanuel en la tempo de Jesuo.

Diktita de Humberto de Campos (Spirito), aperas en 1938 la diskutata verko "Brazilo, Koro de l' Mondo, Patrolando de la Evangelio", kiu prezentas la historion, laŭ spirita perspektivo, de nia patrolando kaj de la al ĝi ligitaj eventoj.

Revelaci-karakteraj, doktrina kaj scienca estas la serio Andreo Ludoviko, konsistanta el rimarkinde gravaj verkoj, kies plimulto kompletigas, koncerne la vivon postmortan, pli frue aperintajn verkojn, kiel tiujn de Swedenborg, Andrew Jackson Davis, Alphonse Cahagnet, G. Vale Owen kaj aliaj. Al tiu serio apartenas: "Nia Hejmo", "La Kurieroj", "Misiuloj de la Lumo", "Laboristoj de la Eterna Vivo", "En la Pli Granda Mondo", "Kristana Agendo", "Liberiĝo", "Inter la Tero kaj la Ĉielo", "Sur la Kampo de la Mediumeco", "Ago kaj Reago", "Evoluo en Du Mondo", "Mekanismoj de la Mediumeco", "Spiritisma Konduto", "Sekso kaj Destino", "Senobsedigo", "Kaj la Vivo Daŭras Plu".

Partnere kun la mediumo Waldo Vieira, Franĉjo Xavier psikografie ricevis 17 verkojn. La eksterordinaran mediuman kapablon de Franĉjo Xavier atestas la granda nombro da plej altrangaj spiritaj aŭtoroj, kiuj pere de li manifestiĝas.

Pluraj el liaj libroj estis adaptitaj al teatra enscenigo kaj al radio kaj televido sub la formo de noveloj.

La psikografio estas la plej konata mediuma kapablo de Franĉjo Xavier. Sed aliajn kapablojn li posedas kaj konstante praktikas, kiel la mediumeco paroliva (psikofonio), vidiva, aŭdiva, medicin-preskriba (receptista), k.a.

Sian vere apostolan vivon la mediumo dediĉis al la suferantoj kaj senhavuloj, venintaj de plej foraj regionoj, krom ankaŭ al la mediumaj laboroj, por kiuj li akceptas absolute nenian ajn pagon. La aŭtorrajtojn li sen ia profito forcedas al pluraj Spiritismaj Eldonejoj kaj Societoj, ekde sia unua libro.

Lia vivo kaj lia verkaro estis objekto de multaj intervjuoj per radio kaj televido, krom ankaŭ de komentarioj en gazetoj kaj revuoj, spiritismaj aŭ ne, kaj en libroj, el kiuj menciindas: libreto titolita "Pinga-Fogo, Intervjuoj", publikigita de la Instituto por Spiritisma Disvastigo, el urbo Araras; "Tridek Jarojn kun Franĉjo Xavier", de Clovis Tavares; "En la Mondo de Franĉjo Xavier", de Elias Barbosa; "Belaj Kazoj de Franĉjo Xavier", de Ramiro Gama; "40 Jarojn en la Mondo de la Mediumeco", de Roque Jacinto; "La Psikografio antaŭ la Tribunaloj", de Miguel Timponi; "Amo kaj Saĝo de Emmanuel", de Clovis Tavares; "Ĉeesto de Franĉjo Xavier", de Elias Barbosa; "Franĉjo Xavier Petas Permeson", de Frato Saŭlo, pseŭdonimo de Herculano Pires; "Nia Amiko Xavier", de Luciano Napoleão; "Franĉjo Xavier, la Nuntempa Sanktulo" kaj "La Malliberulo de Kristo", de R. A. Ranieri; "Franĉjo Xavier - Misio de Amo", de la Spiritisma Unuiĝo de la Ŝtato Minas Gerais; "La Vivoj de Franĉjo Xavier", de Marcel Souto Maior, ktp.

## VI - LA AFERO HUMBERTO DE CAMPOS

La alteŝatata brazila verkisto Humberto de Campos, kiu forpasis en 1934, komencis skribi, en 1937, pere de la mediauma kapablo de Franĉjo Xavier, multajn verkojn enhavantajn kronikojn kaj reportaĵojn, kaj ĉiujn eldonis la Brazila Spiritisma Federacio. Inter ili reliefe elstaras la libro "Brazilo, Koro de l' Mondo, Patrolando de la Evangelio". Sed jen, en 1944, la vidvino de Humberto de Campos sin turnas al la Justico kaj iniciatas proceson, kiu akiras famon, kontraŭ la Brazila Spiritisma Federacio kaj Francisco Cândido Xavier, celante havigi al si verdiktan deklaron, ĉu tiu mediauma verkaro "fontas, aŭ ne, de la "spirito" de Humberto de Campos", krom ankaŭ postulante, ke, en jesa okazo, estu aplikataj la sankcioj preskribitaj de la Leĝo.

La afero estigis viglan polemikon, kiu dum longa tempo okupis la spacon de la ĉefaj periodaĵoj en la lando.

Por ke ni faru al ni ideon pri la signifo de tiu proceso en la disvastigado de la spiritismaj principoj, ni ĉi tie resume prezentas kelkajn el la ĉefaj tiamaj deklaroj, ĉerpitajn en la verko "La Psikografio antaŭ la Tribunaloj", de D-ro Miguel Timponi, la ĉefa advokato, kiu klopodis por defendi la mediumon kaj la Brazilan Spiritisman Federacion. Sed ni antaŭe ĝuu la belecon de la sekvantaj esprimoj, kiuj troviĝas en la ĉi-supre menciita verko:

"Sed el la brazila Nordoriento, el tiu Nordoriento riĉa je ĉarmaĵoj kaj misteroj, la voĉo plena de tenero kaj emocio de Sinjorino Ana de Campos Veras, plej amema patrino de la kara kaj populara verkisto, rompis la silenton por donaci al la mediumo el Pedro Leopoldo la fotografion de sia filo kun ĉi tiu esprimoplena dediĉo:

"Al la Estimata S-ro Francisco Cândido Xavier, sindona spirita peranto de mia karmemora Humberto, mi plejame donacas ĉi tiun fotografion, kiel ateston pri mia amikeco kaj danko.

Respekte Via.

Ana de Campos Veras

Parnaíba, 21-5-38."

Kiel raportite en la numero de "O Globo", de la 19<sup>a</sup> de Julio 1944, tiu atestimata sinjorino konfirmas, ke temas ja pri la stilo de lia filo, kaj ŝi asertas al la redaktisto de "O Povo" kaj "Press Parga":

"- Mi efektive - diris sinjorino Ana Campos - legis kortuŝita la verkon "Transtombaj Kronikoj" kaj konstatis, ke tie montriĝas la stilo mem de mia filo. Mi tute ne hezitas tion aserti, krom ankaŭ ke mi ja konas nenian sciencan klarigon pri tiu mistero, des pli se oni konsideras, ke Francisco Xavier estas homo kun tre malvasta instruiteco. Kie do la falsado? En la okazo se la Tribunalalo agnoskos por tiu verkaro la efektivan aŭtorecon de Humberto, estos ja juste, ke la aŭtorrajtoj apartenu al la familio. Sed se la juĝistoj decidis kontraŭe, mi opinias, ke nialanda intelektularo plenumus agon de justeco, enkondukante Francisco-n Cândido Xavier en la Brazilan Belettran Akademion... Nur homo tre inteligenta, tre klera kaj kun rafinita literatura talento povus esti skribinta tian verkaron, ja tiel identiĝintan al la verkaro de mia filo."

En la punkto de la 15<sup>a</sup> de Julio 1944, kiam la proceso atingis sian klimakson, la Spirito Humberto de Campos revenas per la kraĵono de Franĉjo Xavier. Per sia nekonfuzeble karakteriza stilo, li skribas belegan kaj kortuŝan paĝon pri la bedaŭrinda afero, naskita de la homa nekomprenejo, paĝo, kiun oni povas senpere ĝui en la libro "La Psikografio antaŭ la Tribunaloj".

De tiam li ekuzis la simplan nomon Frato X, ian kristanigitan version de la nomo Konsilanto XX, per kiu li, ankoraŭ enkarniĝinta, estis konata en la literaturaj rondoj.

La iniciatinto de la proceso, Sinjorino Catarina Vergolino de Campos, estis juĝita senrajta al la proceso laŭ verdikto eldirita en la 23<sup>a</sup> de Aŭgusto 1944 de D-ro João Frederico Mourão Russell, Jura Juĝisto oficanta en la 8<sup>a</sup> Civila Juĝfako de la eksa Federacia Distrikto. La vidvino apelaciis, sed la Apelacia Kortumo de la eksa Federacia Distrikto ĝin konfirmis per raporto de la karmemora ministro Álvaro Moutinho Ribeiro da Costa.

## VII - LA AMO DE FRANĈJO XAVIER AL JESUO

Deklaro de Franĉjo Xavier:

"(...) Dio konsentu al mi la ĝojon ĉiam ankoraŭ laboradi por la Granda Afero de Jesuo, Nia Sinjoro kaj Majstro. Detempe de mia infaneco, impresas min la figuro de la Kristo. Perdinte la patrinon en la aĝo de kvin jaroj, mi, sekvante ŝiajn instruojn, ekkredis al Li, ĉar mi estis certa pri tio, ke Li min subtenos. Kondukite al fremda domo, en kiu mi estis spertonta multe da malfacilaĵoj por daŭre vivi, mi memoradis Lin kun la konvinko, ke Li estas potenca kaj kompatema amiko, kiu min provizos per rezistaj rimedoj. Kaj kiam la unuan fojon mi vidis mian elkarniĝintan patrinon, havante en mia kapo nenian scion pri la interreligiaj konfliktoj, kiuj disigas la Homaron, mi petis, ke ŝi donu al mi sian benon, laŭ la kutimo en nia familio, kaj kion mi al ŝi demandis mi nun klare memoras:

- Panjo, ĉu estis Jesuo, kiu sendis vin por nin forkonduki?

Ŝi ridetis kaj respondis:

- Jes, sed Jesuo deziras, ke vi, miaj disigitaj filoj, ĉiam ankoraŭ atendu min...

Mi, kvankam plorante, akceptis kion ŝi diris, ĉar la aludo al Jesuo min trankviligis. Kiam mia patro duafoje edziĝis kaj mia dua patrino sendis voki min ĉe ŝi, mi, rimarkante ŝian naturan bonecon, demandis:

- Ĉu estis Jesuo, kiu sendis vin por rekolekti nin?

Ŝi respondis:

- Franĉjo, tion mi ne scias...

Sed tiel granda estis mia fido, ke mi asertis al ŝi:

- Jes, estis Li mem... Kiam mia patrino aperas al mi, ŝi ĉiam diras, ke Li sendos iun por nin rekonduki al nia domo.

Kaj Jesuo ĉiam estis kaj estas en miaj rememoroj kiel Potenca kaj Bona Protektanto, ne foririnta, ne malproksima, sed ja ĉiam proksima, ne indiferenta al niaj homaj obstakloj, sed ja ĉiam pli kaj pli aganta kaj viva.

## VIII – ISMAEL

Oni ne povas nei la senton de respekto al la nobla figuro de Iŝmael, la spirita gvidanto de Brazilo. Lia respondeco kiel mentoro de la Brazila Spiritisma Federacio estigas en la nacia spiritista komunumo profundan respekton, al kiu aliĝas granda kareso kaj dolĉa tenero.

Iam oni demandis al Franĉjo Xavier:

- Kiel okazas, en la brilegaj sferoj de la Spirita Mondo, la renkontiĝoj de Emmanuel kun Iŝmael? Kian sintenon alprenas la admirinda Spirito de la eksa roma senatano antaŭ la same luma estulo, al kiu Jesuo konfidis la destinojn de Brazilo?

Respondo de la mediumo, mallonga, serena, firma:

- Genustaran!

-

## IX - MALLONGAJ DEKLAROJ PRI LA MEDIUMO FRANĈJO XAVIER

"La mediume verkita bibliografio, kiu, dank'al la perado de Franĉjo Xavier, aldoniĝis al la spiritisma literaturo en la lastaj kvindek jaroj - kaj la spaco ne permesas al ni eĉ mallongajn konsiderojn pri ties enhavo - estas konsiderinde vasta kaj kvalite admirinda. Ni povus, sen ia malhelpo, per serena kaj absolute senpartia ekzameno, dividi la mediuman verkaron, diktitan laŭ planado de la Spirito Emmanuel, ankaŭ en nete distingiĝaj etapoj, laŭ jenaj du grandaj sekcioj: la unua, pruvanta la transvicon kaj la

senmortecon de la Spirito — ("Brazilo, Koro de l' Mondo, Patrolando de la Evangelio") —, kiun sekvas ia panorama rigardo al la Universala Historio — ("Sur la Vojo al la Lumo") kaj iaj pli valoraj gvidlibroj kiel "Emmanuel, Mediumaj Instruoj", "La Konsolanto", "Gvidlibro". Konklude, multaj interesaj kaj instruaj studoj venos en la oportuna tempo. Kaj la verko de Francisco Cândido Xavier, laŭkriterie tradukita, siatempe disponeblos al legontoj en la tuta mondo, kune kun la verkaro de Allan Kardec kaj de tiuj aŭtoroj, kiuj verkis tekstojn komprehelpajn kaj komplementajn al la Kardec-a Sistemigo. Sed dume, kaj cele al la dezirata glateco en la konscienca kaj respondeca disvastigado de la Spiritisma Doktrino, estus bone ne preteratenti la fakton, ke Franĉjo Xavier neniam sukcesus kiel instrumento de la Supro, se li ne estus obeinta la rigoran disciplinon al li proponitan de Emmanuel, atestante kaj ekzemplante la amon al la proksimulo kaj al Dio, unuvorte praktikante la Evangelion.

Francisco Thiesen  
Prezidanto de la Brazila Spiritisma Federacio"

(Fonto: "Revista Internacional de Espiritismo", numero 6, Jaro LII, Julio 1977.)

---

"... Mi ne rigardas min inda ion skribi pri Franĉjo. Pri li donas ateston (kaj kian ateston!) la belajn verkojn, kiujn li semis kaj daŭre semas en ĉiuj anguloj de Brazilo, kaj kiuj estigas bonfarajn rezultojn en diversaj landoj de la mondo. Kaj, dirante "verkojn", mi aludas ne nur skribojn kaj parolojn, sed ankaŭ liajn ekzemplojn de karitato, pardono, fido, humileco, liajn fratajn kaj fruktodonajn konversaciojn, fine lian multforman evangelian konduton ĉe malriĉuloj kaj riĉuloj, en ĉiutaga laborado por edifo kaj altigo de spiritoj."

De tre longe mi konas Franĉjon. En liaj mediumaj libro mi trovis fortojn, lumon kaj pacon, kaj per liaj leteroj mi povis lin senti kaj ami plejprofunde en lia esto. Multajn fojojn mi ploris pro liaj zorgoj kaj doloro, kunsentante liajn gravajn respondecojn kaj bedaŭrante la nekomprenemon de l' homoj. Sed mi ĉiam preĝis, petante al la Sinjoro ne formeti la pezan ŝarĝon de sur liaj ŝultroj, sed ja helpi, ke li povu ĝin porti. Dank'al Dio nia kara Franĉjo ĉiam venkas ĉiujn malfacilaĵojn kaj barojn sur la vojo, en herculesa maratono, kiu lin efektive indigas en la okuloj de l' homoj kaj en la okuloj de la Patro."

(Pecoj el letero de S-ro Zêus Wantuil, 3<sup>a</sup> Sekretario de la Brazila Spiritisma Federacio, al la Prezidantino de la Spiritisma Unuiĝo de la Ŝtato Minas Gerais).

(Fonto: "O Espírita Mineiro", numero 172, Majo/Julio 1977).

## **X- PAROLO DE FRANĈJO XAVIER, OKAZE DE LA KVARDEKJARIĜO DE LIA MEDIUMA AGADO (1967)**

"Tiuj kvardek jaroj da mediuma agado eniris mian koron kiel agrabla songo. Estis kvardek jaroj da granda ĝojo, sur kies vojoj, faritaj el minutoj, horoj, tagoj, mi nur trovis bonfarojn, feliĉojn, esperojn, optimismon, kuraĝigan subtenon de ĉiuj, kiujn la Sinjoro al mi donis, nome familianoj, fratoj, amikoj kaj kompanoj. Kvardek jaroj da feliĉo, kiujn mi dankas al Dio per viaj koroj, ĉar mi sentas, ke Dio ilin donis al mi en viaj koroj, kiuj reprezentas multajn aliajn jam forestantajn korojn. Nun mi sentas, ke per vi Dio konsentis al mi vivon plenan de ĝojoj kaj benoj, kiajn mi povus ricevi ĉe neniu alia laborkampo de la Homaro. Pro tio, mi kisas al vi la manojn, la korojn. koncerne la librojn, mi devas diri, ke iam, antaŭ multe da jaroj, celante komunikiĝi kun la Spirito de nia protektanto Emmanuel, apud malnova akvobaraĵo en la regiono, kiu al mi servis kiel lulilo en la nuna enkarniĝo, mi ofte tien iris

matene antaŭ la sunnaskiĝo. Kaj ĉe la tagiĝo, ĉu brilis la suno, ĉu pluvigis, tie troviĝis, ne malproksime, malgranda marĉo. Tiu marĉo iom post iom pleniĝis per floroj, kompreneble dank'al la korfavoro de Dio. Kaj multaj bonaj animoj, amataj koroj, kiuj preterpasis tiun lokon, kie mi preĝadis, plukis tiujn florojn kaj ilin portis kun ĝojo kaj raviteco. Dume la marĉo ĉiam ankoraŭ restis la sama marĉo, kompreneble atendante la korfavoron de Dio por transformiĝi en fruktodonan, pli utilan grundon. Nun, kiam mi aŭdas la vortojn de tiuj admirindaj koroj, kiuj priparolis la aperon de tiuj cent libro — nun cent du — mi ree prezentas al mi tiun bildon, kiu neniam malaperis el mia memoro, por deklari al vi, ke mi rigardas min kiel tiun marĉon, kiu iam, pro la korfavoro de Dio, ricevis tiajn florojn, nome la librojn, kiuj pli ĝuste apartenas al vi, ol al mi. Mi do petas al vi ĉiuj, miaj kamaradoj, helpi min per viaj preĝoj, por ke la komuna vivpenado drenu tiun marĉan teron, kia mi ankoraŭ estas, en la interno de mia koro, tiel ke mi iam povu servi al Dio, plenumante la devojn, kiujn Lia senlima korfavoro difinis al mi. Kaj mi petas, do, la permeson esprimi mian dankon, ĉar proprajn dankvortojn mi ne kapablas eldiri; la permeson por fini mian senvaloran parolon per la preĝo, kiun al ni postlasis Nia Sinjoro Jesuo Kristo."

Fonto: "O Espírita Mineiro", numero 137, Aprilo/Majo/Junio 1970).

## **XI - EN LA MEDIUMA LABORADO**

"Demando — En via unua renkontiĝo kun Emmanuel li forte emfazis la disciplinon. Ĉu li ion pli priparolis?"

Respondo — Post la reliefigo de disciplino kiel nepre necesa elemento por bona mediuma laborado, li diris al mi: "Ni devas ion kune efektiviĝi." Mi lin demandis, pri kio temas, kaj la bonfara protektanto klarigis: "Kiel komencon, tridek librojn!" Mi tiam pripensis: kiel taksi tian sciigon, konsiderante, ke nia familio ne disponas grandajn rimedojn, krom nur nia ĉiutaga perlaborado, kaj ke la publikigo de libro ja postulas tiom da mono!... Ĉar mia patro vendadis biletojn de loterio, mi aldone demandis: ĉu mia patro ricevos la grandan loton?" Emmanuel respondis: "Ne, tute ne. La plej granda loto estas laboradi kun vigla fido al la Dia Providenco. La libro venos per neatenditaj vojoj!"

Sendinte la poemojn de "Transtomba Parnaso" al unu el la estraranoj de la Brazila Spiritisma Federacio, mi iom poste havis la agrablan surprizon vidi ĉi tiun libron akceptita kaj publikigita en 1932. Aliaj sekvis post ĝi, kaj en 1947 ni atingis la limon de la 30 libroj.

Ni ege ĝojis kaj mi demandis al la spirita amiko, ĉu la tasko estas finita. Li, ridetante, informis: "Nun ni komencos novan tridekvoluman serion!" En 1958 mi denove demandis, ĉu la laboro finiĝis. 60 libro jam estis publikigitaj kaj mi tiam estis tuj transloĝiĝonta al la urbo Uberaba, kie mi alvenis en la 5<sup>a</sup> de Januaro 1959. La granda protektanto pacience klarigis: "Vi demandis, en Pedro Leopoldo, ĉu nia tasko finplenumiĝis, sed mi volas informi al vi, ke la mentoroj agantaj en la Pli Granda Vivo, al kiuj mi devas discipline obei, avertis min pri tio, ke nin koncernas atingi la limon de cent libroj." Mi tre miris, kaj la laboroj ĉiam ankoraŭ daŭris. Atinginte la limon de cent libroj, mi denove konsultis lin pri la fino de nia sindevigo. Li bonkore klarigis: "Vi tute ne strebu al tiel hasta agado kaj laborado. Nun mi devas sciigi al vi, ke la mentoroj el la Supera Vivo, kiuj nin gvidas, preskribis al vi la senposedigon de via nuna enkarniĝo favore al la disvastigado de la principoj kristan-spiritismaj, kio signifas, ke via fizika ekzistado devas resti je la dispono de la spiritaj estaĵoj povantaj kunlabori per diktado de mesaĝoj kaj libroj, tiel longe dum via korpo povos servi al niaj aktivecoj."

Forte desapontita, mi demandis: ĉu mi do devos labori ĉe la perado de transmondaj mesaĝoj kaj libroj ĝis la fino de mia nuna ekzistado? Emmanuel akcente konfirmis: "Jes, ni ne disponas alternativon!" Nature impresita de lia sciigo, mi ree demandis: kaj se mi rifuzos, surbaze de tiu instruo de la Spiritisma Doktrino, laŭ kiu ni havas liberan volon por decidi pri niaj vojoj? Emmanuel ridetis kun patra bonvolo kaj

min avertis: "Tiu ordona preskribo, pri kiu mi parolis al vi, similas dekretan pri senposedigo eldonitan de surtera aŭtoritato. Laŭ mia scio, se vi rifuzos al tia servado, la gvidantoj de tiu laboro, nome ke ni nin dediĉu al la Reviviĝinta Kristanismo, disponos sufiĉan aŭtoritan povon por definitive forigi vin el via fizika korpo!"

Aŭdinte tiun averton, mi silentis kaj komencis pripensi la gravecon de la afero. Kaj mi ĉiam ankoraŭ laboradas, sen ia intenco iam ajn interrompi aŭ malfaciligi la plenumon de tio, kion mi de tiam nomis "Supraj Decidoj".

Fonto: "O Espirita Mineiro", numero 205, Aprilo/Junio 1988).

## **XII - LASTAJ INFORMOJ**

En 1977, Franĉjo Xavier atingis 70-jaran senĉesan mediuman agadon. Tiu agado, kun plej alta spirita karaktero, celis la bonon de la Homaro kaj tuŝis ties plej diversajn apartaĵojn.

Ĝis la nuna dato, oktobro 1997, Francisco Cândido Xavier jam psikografie ricevis pli ol 400 (kvarcent) mediumajn verkojn de centoj da spiritaj aŭtoroj. Ili tre diversas per malsamaj formoj, nome poemoj, romanoj, rakontoj, kronikoj, historio universala kaj de Brazilo, scienco, religio, filozofio, porinfana literaturo, ktp.

Tagojn kaj noktojn li oferadas al siaj similuloj, koste de sia sano. Organaj malsanoj akompanis lin dum la juneco kaj la plenaĝeco. Hodiaŭ, ĉe la benataj 87 jaroj de sia korpa ekzistado, la organaj malfacilaĵoj ĉiam ankoraŭ portas problemojn al li. Gravas rimarkigi, ke la okulmalsanoj kaj kirurgiaj operacioj neniam malhelpis lin plenumi, fidele kaj digne, sian mision de subteno al la bezonuloj. Unu sola estas lia sinteno, nur unu regulon li obeas: amon al la proksimulo, seninteresiĝo pri la materiaj havaĵoj, ekskluziva kaj konstanta zorgo pri la feliĉo de la proksimulo.

Riĉuloj kaj malriĉuloj, maljunuloj kaj infanoj, viroj kaj virinoj de ĉiuj sociaj rangoj trovas ĉe la homo kaj ĉe la mediumo Franĉjo Xavier ĉion, kion ili bezonas por sia intima renoviĝo, por sia kreskado laŭ scio kaj boneco.

Francisco Cândido Xavier estas donaco de la Supro al la 20<sup>a</sup> Jarcento, kies valoroj pliriĉiĝas per lia vivo de kondutekzempla civitano, per miloj da psikografiaj mesaĝoj, kiuj kvazaŭ kaskadoj el paco kaj lumo, amo kaj instruo, fekundigas la planedan grundon, sub la luma superrigardo de la Spirito Emmanuel.

**NOTO DE LA BRAZILA SPIRITISMA FEDERACIO** - Por tiu ĉi teksto estis konsultitaj kaj uzitaj jenaj verkoj:

A Psicografia ante os Tribunais (La Psikografio antaŭ la Tribunaloj). / Miguel Timponi. / FEB - 5<sup>a</sup> eld., 1978.

Brasil, Mais Além! (Brazilo, Pli Transen!). / Duílio Lena Béni. / FEB - 5<sup>a</sup> eld., 1994.

Chico Xavier - Mandato de Amor (Franĉjo Xavier - Mision de Amo). / União Espirita Mineira (Spiritisma Unuiĝo de la Ŝtato Minas Gerais), 1992.

Chico Xavier - Mediunidade e Coração (Franĉjo Xavier - Mediumeco kaj Koro). / Carlos A. Bacelli. / Instituto Divulgação Ed. André Luiz, 1985.

Espiritismo Básico (Baza Spiritismo). / FEB - 4<sup>a</sup> eld., 1995.